



Karaj geamikoj,

jen tute konciza AVENO – sen la detalaj informoj pri ekologio, ekonomio, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, kaj Verdaj Partioj. Semajna rete & www.verduloj.org/aveno.htm
La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Civil-Socia Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en CSO, respektive Ne-Registaraj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto kaj reciproke.

Renkontiĝo de AVE:

2017-06-04 AVE che GEA kaj EEU en Freiburg che UK, SAT ?

Raporto:

2017-03-30/04-02 Liverpool (GB), AVE che la **Tutmonda Kongreso - globalgreens.org**
AVE partoprenis jam la 4an fojon. Deĵoris 3 AVE-anoj (Manfred, Marteno, Ronaldo) kun forta subteno Peeter kaj Brendan el Liverpool. En la kongresa broŝuro konciza teksto Verduloj & eo. Ni renkontis 3 plurajn samideanojn kiuj aktivis en sialanda Verda Partio: Sally (GB), Diana (DE) kaj Stephanie (AR); krome plurajn kiuj iam eklernis Esperanton, inter ili Reinhard Bütikofer, MEP. Entute pli ol 10 samideanoj partoprenis kongreson de ĉirkaŭ 2000 personoj.

Ni informis pri Esperanto pere de inform-tablo kaj -panelo. Sur la panelo:
- informshildo nia emblemo „Asocio de Verduloj Esperantistaj“ & „Assn. Esperanto Greens“;
- la bela afiŝo en pli ol 100 lingvoj „PACO estas kiam ni agas juste ...“ kiun ni voĉlegis plurfoje;
- afiŝo de la germana „Die Grünen“ el 1984 kiu montras chielarkon kaj „Atomenergie – Nein Danke!“ en 40 lingvoj, inter ili Esperanton;
- 100-jarigo de Eo kun la foto de L.L.Zamenhof. Ni montris verdpartiajn dokumentojn en eo, literaturon kiel Monato, esperanto de UEA, lernolibron de St. Marcek, romanon de Heinrich Böll, broŝurojn pri budhismo, de TEVA, ktp. Ni havis la eblecon informi multajn pri la avantaĝoj de Esperanto servi kiel justa lingvo-ponto. Nur malmultaj diris ke ili tute perdis la esperon ke Esperanto iam povus servi ĝenerale kiel lingvo-ponto.

Kelkaj miris kaj stumblis pri la ne-simetria gendra sufikso -in- ! Ni klarigis ke intertempe evoluighis la lingvo, ke paralele al -in- ekzistas -ich- ; do, knabo > knabino > knabicho ktp.

Du apartaj surprizoj okazis:

1. Dum kunsido de la **Tutmonda Verda Junularo**, kie grava lingva problemo montrighis, Stephanie proponis Esperanton kiel ebla solvo; al kiu respondis iu alia, ke ja ekzistas inform-tablo pri Esperanto en la informo-foirejo.
2. **Green Left**, maldekstra grupo en la brita Verda Partio, okaze de baloto por la EU-Parlamento disdonis insignon kun subskribo „Elekti Verdulojn“ en 8 lingvoj inter ili Esperanto !

Ni tradukas la „Deklaron de Liverpool“.

AVE-anoj pensas tutmonde & agas surloke kaj regione.

Agado: AVE (ek de 1984) informas rete semajne en AVENO pri ekologia, sociala, paca de la Verda Movado kaj Partioj. I.a. kunlaboras kaj tradukas: Francio: Esperanto-komisiono EELV; Germanio: gruene-jugend.de serchu Esperanto Tutmondaj Verduloj: Charto 2012 & 2017* : globalgreens.org/globalcharter
Verda & Regionala EP-Frakcio, 2004-2009; 116 Argumentoj kontraŭ Atomenergio; Plastajhoj k. kemiaĵoj en la maro & akvaroj; Konsiloj pri Efika Uzado de Energio; Dauripova agrikulturo, fekunda grundo; k.a. Sur: verduloj.org > Dokumentoj

Bonvolu subteni projektojn de esperantistoj:
verduloj.org/afriko.htm

Mazingira (nord-okcidenta Tanzanio): pri trinkakvo, biogaso, re-arbarigo, kuiru ligno-shpareme, radio-stacio, sunflora oleo.

2016 por pluvakvo-baseno por ĝardenoj kaj bestoj – lasi grundakvon por homoj.

Subtenis operaciojn de infanoj.

Orfoj: daŭra subteno, pagante lernejkotizon 20/40 Euro. **Por la junulinoj** kiuj loghas iom for de la mez-lernejo „Esperanto Secondary School“ **2017 ni kolektas por internato.**

Mazingira ghirante al: IBAN: BE66 0000 2653 3843; BIC: BPOTBEB1 de FEL, menciui: „Mazingira, internato & via nomo“

PIEADC en Kalima (CD), tie Etienne reaktivis agro- kaj fish-kulturon, solubra trinkakvo: **2017 ni kolektas por la 4a** kiu projekto: trinkakvo por 4 mil homoj.

Uvira (CD): subteni rearbarigon, lernantoj

UEA: AVE ekde 1998 rilate AGENDOn 21 . Por **membrighi** al AVE ne necesas esti membro de iu Verda Partio, sed vi devus akcepti niajn celojn. AVE havas ĉ. 300 membrojn. Bonvolu membrighi en Verda Partio de via lando – vizitu globalgreens.org/federations > About us > Green Federations > trovu vian partion.

Kontribuoj bonvenaj pere de artikolo kaj kunlaboro en via-landa Verda Partio au CSO. Ni preferas koncizan tekston (rtf): (ch-u, cx-ux)
AVE-Kotizo: 5+x Euro, nia UEA-konto: avex-z
UEA konto ING: BIC/SWIFT: INGBNL2A, IBAN: NL72INGB0000378964.

Menciui: "por avex-z, via nomo & la projekto“
AVE sekretario:

Manfred Westermayer
Kandelstr. 62
DE-79194 Gundelfingen/Brsg
ave@verduloj.org
www.verduloj.org

